

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. July-August 1974.
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.

CRISIS—Disaster or Opportunity?

It is said that the Chinese ideogram for "crisis" is composed of the two ideograms meaning "disaster" and "opportunity". ELNA is headed for one of these, and which one it will be is going to depend on you.

ELNA needs money to keep up active information and book services—to finance exhibits and other publicity activities—to put out this newsletter and other publications. Where will this money come from? Unfortunately, it will definitely not be covered by your dues. ELNA will need several hundred more members before that is possible. So what is left?

First, you can help with more members for ELNA. See if there aren't a few members of your local Esperanto group who have yet to join. Recruit members from local Esperanto classes. Refer inquirers about Esperanto to ELNA so that they will receive an application form.

Second, you can make a financial contribution, modest or immodest! Remember, ELNA is recognized as a non-profit organization by the IRS. If you need a way to lower your bracket, make a tax-deductible contribution to your League!

One possibility, if you can't give as much as you would like to right now, is to make a pledge: yearly, quarterly, monthly, weekly—this is up to you, as is the amount. This is the solution ELNA would like to see, for it would signify that the membership intends to make an ongoing commitment to the League and, through it, to the progress of the international language Esperanto.

Premiums for Contributors

Two members of ELNA have very generously made non-monetary contributions to be used in the Central Office financial campaign. Duncan Charters donated several complete sets of the handouts used in his course on Esperanto teaching methods. These hectographed pages,



ELNA Treasurer Peggy Linker and Director Doris Vallon signal a momentary victory: contributions totalling over \$1500 at the ELNA Congress in Spokane.

mostly in the English language, deal with culture as a part of language learning, the various schools of thought in theory and practice, and various other aspects of the field. Charles F. Post has contributed several copies of his original story La Psika Basballudisto. This is something of a collector's item, being one of the handful of Esperanto publications printed (not xeroxed, not offset, but printed with old-fashioned movable type) in the United States.

We will be happy to send one of these desirable items to each member who contributes \$15.00 or more to the Central Office fund. Contributors of \$25.00 or more may receive both. Quantities are extremely limited, so act now! Send your contribution today, mentioning the premium(s) desired, to Mrs. Peggy Linker, Treasurer, Esperanto League for North America, 1414 Monroe Street, Walla Walla, WA 99362. Make checks out to "ELNA".

ELNA Central Office Budget

(Fiscal Year 1974-1975)

EXPENSES

Salary	\$ 8,400
Rent	1,800
Telephone	180
Postage	720
Publicity	1,600
New book stock*	1,000
Book catalogue	1,000
Annual (<u>Usona koktelo</u>)	600
Directory (<u>Adresaro</u>)	600
Miscellaneous	350
TOTAL	<u>\$16,250</u>

INCOME

Current balance	\$ 640
Book service profit**	3,000
Sale of publicity materials	150
Contribution of ELNA	2,800
Donations (Spokane)	1,677
TOTAL	<u>\$ 8,267</u>
Expense total	- 16,250
SHORTAGE	- \$ 7,983

As you can see, we need nearly eight thousand dollars in contributions to assure the survival of the Central Office, which means the survival of ELNA, which in turn means the continued progress of the international language in the United States. The need is now!

* This figure is based on modest purchase of new and replacement book stock in order to supplement current stock.

** 25% of net receipts will be profit to ELNA until payment is completed to current owner of stock.

Chicano?

Overheard by Louis Stein at Whitworth College during the ELNA Congress: "I tell you they're not speaking Spanish, they're speaking Chicano. I'm from Southern California and I know what I'm talking about! I'm sure they're speaking Chicano!"

Missing Members

The following are paid-up members of ELNA who have moved without sending us any forwarding address, because of which we are unable to send them this Newsletter. Should you know any of them, please tell them that we need a current address!

Calla (Callia?) Allen
 Louisa Ansbacher
 Ann Bodine
 David Allen Hendrickson
 Arthur J. Hills

Protokolo de la 22a ELNA-Kongreso

Prezidanto Jim Lieberman bonvenigis ĉiujn membrojn kaj dankis al la Loka Kongresa Komitato pro la bonaj aranĝoj, la bela loko, kaj la malalta kosto de ĉambroj kaj manĝoj.

Ĉiuj raportantoj persone transdonis sian raporton al la Kongreso (vidu aliloke en ĉi tiu numero).

Pro manko de ensenditaj balotiloj, la Prezidanto petis ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne voĉdonis, jam fari tion. La kalkulkomitato pri la balotiloj konsistis el kvar: W. Campbell Nelson, Peggy D. Linker, Anne Whitteker kaj Robert E. Bailey. Rezultoj:

Estraro:

Sekretario:

*Ken Thomson	58	*Robert E. Bailey	25
*Gerald Cirrincione	42	Bonnie Helmuth	**1
*Allan C. Boschen	41		
Armin Doneis	34		
Brian Neil Burg	33		
Bernice Garrett	27	* Venkis.	
John Futran	14	** Enskribita.	

Ne enkalkulitaj estis kvar nevalidaj balotiloj.

Ken Ver Ploeg legis saluttelegramon de Spokane-ĝemelurbo Niŝinomija, Japanujo.

Mark Starr salutis la Kongreson je la nomo de sia sindikato, American Federation of Teachers.

Armin Doneis sugestis, por ŝpari poŝtkoston, ke ELNA- kaj UEA-aligiloj eliru kune, sub lia prizorgo.

La Estraro decidis ĉesigi la senpagajn abonojn al Heroldo de Esperanto por novaj anoj, pro tio, ke la kosto al ELNA (po \$4,00) estas tro granda parto de unuajara kotizo. Cetere, oni konsilis prokrasti eldonon de la literatura jarkajero Usona koktelo ĝis 1975, ĉar ELNA jam eldonas bonkvalitan libroliston kaj novan adresaron ĉi-jare.

Oni nomis Vilhelmon Schulze estro de la nova kandidatiga komitato, kaj petis, ke li elektu kvar pliajn membrojn.

Nian tutkoran dankon

al ĉiuj, kiuj helpis sukcesigi la 22an ELNA-Kongreson. Ni aparte agnoskas la meritplanan laboron de la LKK: ges-roj H. Ken Ver Ploeg, s-ro Edgar Mason, s-ino Lee Schmidt, kaj pastro Wilbur Lane. Ni dankas ankaŭ al ĉiuj, kiuj faris prezentadojn por helpi al siaj samideanoj iom malstreĉigi: bankeda konferan-Charters; Roan Orloff Stone, kiu faris tri apartajn prezentadojn, inkluzive unu, kiun ŝi devis prepari tute lastmomente pro neatendita paneo ĉe alia programero; B. J. Balcar, kiu pianludis; Martha Deer, kiu kantis; ŝia patro Jim Deer, kiu prelegis pri Mondvida Tago; kaj ĉiuj aliaj, kies eventuala nemenciiteco ŝuldiĝas al redaktora forgesemo.

Raporto de la Vicprezidanto

La Vicprezidanto aktivis plejparte per varbado por la Esperanto-kursaro ĉe San-Franciska Ŝtata Universitato, instigado, helpado kaj deĵorado ĉe pluraj ekspozicioj, reklamoj por la libroservo kaj la kursaro en diversaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kaj konsilado al la Direktoro de la Centra Oficejo.

—Catherine L. Schulze

Raporto de la Centra Oficejo

Ekde februaro, la Direktoro pritraktis pli ol ducent informpetojn, plej ofte sendante diversajn presitajn informilojn kun aliĝilo. Li intervjuiĝis kaj faris paroladojn pri la internacia lingvo sesfoje. Li represigis kelkajn informilojn, kaj konstatis kontente, ke kelkaj anoj mendas ilin grandkvante por ekspozicioj kaj aliaj varbagadoj.

La organo faris rimarkindan progreson kaj enhave kaj teĥnike. Kunmetiĝis redakcia komitato por la eldonota literatura jarkajero Usona koktelo. Baldaŭ aperos nova adresaro.

Ankoraŭ enkadrigota en la laborojn de la Centra Oficejo estas la Libroservo, sed la plej gravaj preparlaboroj jam estas faritaj.

—Charles R. L. Power

Raporto de la Ekzamena Servo

De 1973.06.19 ĝis 1974.06.01, 22 personoj provis la Komencgradan Ekzamenon. 21 sukcesis, 5 kun honoro. Inter la sukcesintoj troviĝas ok, kiuj studis nur ok semajnojn, en la klaso de s-ino Winnifred Breegle (vd. la lastan numeron, "Latin Class Wins with Esperanto"). Kvin provis la Mezgradan Ekzamenon, ĉiuj kun sukceso, du (Stuart E. Kittredge kaj Vincent Broman) kun honoro.

Enspezoj sumis je \$105,27, elspezoj je \$38,56, lasante saldon pozitivan de \$66,71.

—Roy kaj Doroteo Holland

Raporto pri Semajno de Internacia Amikeco

En 1974 okazis multe pli da agado, bona signo de la antaŭeniro de Esperanto en Usono.

Proklamoj de SIA venis de urbestroj de Monterey, Pacific Grove, San Francisco kaj San Mateo, CA; Boston kaj Pittsfield, MA; Portland, OR; Spokane kaj Walla Walla, WA; de la ŝerifo de Berkshire-provinco, MA; de la ŝtatestroj de Masaŭuseco kaj Vaŝingtonio.

Okazis ekspozicioj kaj aliaj aktivecoj en Lawrence, KS; Hermosa Beach kaj Manhattan Beach, CA; Aberdeen kaj Walla Walla, WA.

Enspeziĝis \$14,75 pro vendo de 250 afiŝoj kaj 295 salutkartoj.

Ni ĉiuj kunlaboru por pli sukcesa SIA en 1975!

—Roan Orloff Stone kaj Ken Thomson

Raporto de la Sekretario

La sekretaria laboro ne estas granda pro la proksimeco kaj kunlaboro de la Esperanto-Infomcentro. La Vicprezidanto aŭ Direktoro respondas al ĉiuj enketoj kaj petoj.

Por la jaro 1973-4, telefona, poŝta kaj kongresa elspezoj estis \$75,00—donacitaj al ELNA.

—Robert E. Bailey

Korespondaj instruistoj serĉataj

La Internacia Koresponda Kurso iniciatita de JEN bezonas kaj estron kaj instruistojn. En la momento la Direktoro de la C. O. ne tre volonte akceptas la estran titolon, kaj havas nur du instruistojn.

La bazaj devoj de la IKK-estro estas alsendi la kursmaterialojn (kiujn ELNA provizos) kaj kunigi ĉiun lernanton kun instruisto. Li aŭ ŝi devas varbi instruistojn, kontroli ilian kompetentecon kaj ĝenerale funkciigi la aferon. La estro rajtos, se montriĝos dezirinda, prepari novajn aŭ revizii la ekzistantajn kursmaterialojn (la nunaj baziĝas sur Privilegia vojo).

La devoj de la instruistoj estas korekti la ekzamenojn, eventuale klarigante malfacilajn punktojn al siaj lernantoj. Kompreneble, instruisto devas mem modele posedi la lingvon.

Ambaŭ postenoj kunportas modestan tantimon por ĉiu lernanto. Kandidatoj bonvolu sin prezenti al la Centra Oficejo.

Ĉina Esperanta monata gazeto

EL POPOLA ĜINIO

Varbas abonuntojn de 1974


Abonprezo:

1 jaro	US \$ 2.20
2 jaroj	US \$ 3.30
3 jaroj	US \$ 4.40

Abonu ĉe: Esperanto-Infomcentro
P.O. Box 508
Burlingame, CA 94010

aŭ rekte ĉe Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,
P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

Specimeno akirebla senpage



Raporto de la Ĉefdelegito

La 3an de junio 1974, UEA havis en Usono 551 validajn membrojn de ĉiuj kategorioj, kontraste kun la cifero 517 por la tuta jaro 1973. Sendube pluraj pluaj aldoniĝos al tiu cifero 551 antaŭ la jarfino. La kontrasto indikas modestan kreskon, sed tio ne respiegulas la veran financon de UEA en Usono. Multaj el niaj fervoraj junuloj, emeritoj kaj aliaj kun nestreĉeblaj enspezoj devis akcepti membrecon malpli altkategorian. Ni nun havas nur 335 membro-abonantojn inkluzive membro-subtenantojn, sed kontraste 116 membrojn-kun-Jarlibro. Do malgraŭ ke nia suma membronombro kreskis, nia financa subteno al UEA malkreskis.

Kiel en antaŭaj jaroj, mi ĉi-jare dissendis 4 000 kvarpagajn kompletojn de informilo-aligilo-mendilo al ĉiuj membroj de kaj ELNA kaj UEA, kaj ankaŭ al eksmembroj, en kombina membro-kampanjo por ambaŭ organizaĵoj, kaj amassendaĵojn de la varbiloj mi sendis al multaj klubestroj, delegitoj, libroservoj, informcentroj, funkciuloj kaj vigluloj en la tuta lando. La rezultoj ŝajnis kontentigaj al UEA kaj ELNA malgraŭ malfavoraj valutaj kaj kotizaj cirkonstancoj. La kostoj de tiu kampanjo estis porciumitaj juste inter ambaŭ organizaĵoj.

Feliĉe la kotizaltigoj ŝajne ne fortimigis tiom da fideluloj, kiom ni antaŭtimis, kaj ni dankas al niaj multaj fideluloj, kiuj des pli profunden fosis en la poŝon por subteni nian movadon. Sen tiu malavaro nia movado estus en katastrofa situacio.

Ĉi-jare ni gajnis 19 novajn Dumvivajn Membrojn, altigante la ciferon por tiu kategorio ĝis 125. Por La Monda Lingvo-Problemo ni havas 17 abonantojn; por Dokumentoj de CED, 17; por Heroldo de Esperanto, 131, krom la abonoj, kiujn peras ELNA por novuloj. Sekve, por ĉiuj eksterlandaj abonoj, kotizoj, libro-mendoj, kongrespagoj ktp., mi enkasigis malnetan sumon de \$12 598 de septembro ĝis junio.

Eventualan plusan saldon miaflankan mi elspezos por utilaj kromaj servoj al niaj membroj en la formo de senpagaj informfolioj, broŝuroj aŭ specimenoj diversspecaj, por strikte kaj rigore konservi la reputacion de "organizo sen profita celo".

Mi estas preta pluservi kiel Usona Ĉefdelegito por UEA, kaj plue kombini la membro-kampanjojn de UEA kaj ELNA, por ebligi grandan ŝparon al ambaŭ, same kiel dum pasintaj jaroj, celkonscie, diligente kaj akurate spite al la dolaraj doloroj, se tiu kombina servo daŭra ŝajnas avantaĝa kaj dezirinda al la Estraro de ELNA. Mi tre kore dankas al ĉiuj, kiuj kunhelpis en niaj atingitaj sukcesaj rezultoj; kaj ankaŭ pro viaj toleremo kaj pacienco!

—Armin F. Doneis

Raporto de la Arkivisto

Kontribuajtoj en formo ekz. de Proklamoj de la Semajno de Internacia Amikeco aŭ eltranĉaĵoj de artikoloj estis senditaj de s-roj L. Cook, C. C. Cope, A. Doneis, C. Post, M. Starr, K. Thomson, L. A. Ware; s-ino G. Harabagiu; ges-roj A. Estling; f-ino E. A. Lewis. Pli grandan kvanton da esperantaĵoj sendis en du kartonskatoloj ges-roj W. Schulze, po unu skatolo s-ino G. Chomette kaj s-ro W. Glenny. S-ino C. Peterson donacis Plenan Ilustritan Vortaron. Bultenojn sendadas Esperanto-Klubo de Los Angeles kaj Esperanto-Societo de Spokane. Senpage ni ricevas ankaŭ plurajn periodaĵojn. Al ĉiuj donacintoj, elkorajn dankojn.

Aĉetaĵo: Urĝe bezonata bretaro por la arkivejo, facile forigebla kaj uzebla aliloke, estis konstruita kaj instalita je kosto de \$30,18, kiun pagis la kaso de ELNA kun la aprobo de la prezidanto. Dankon.

Agado: Dum dek-semajna vojaĝo tra dek unu eŭropaj landoj, mi ĉeestis la 58an UK en Beograd; vizitis la esperantan somerumejon Primosten en Jugoslavio; vizitis la bibliotekon "Jaroslav Ŝustr" de Esperanto-Klubo en Praha; ĉeestis specialan kunvenon de tiu klubo en Praha, kie mi estis intervjuita; trarigardis la arkivon kaj bibliotekon en la domo de Albert Schweitzer en Gunsbach, Francujo; poste vizitis la Centran Oficejon de UEA sub la gvidado de KKS Mikuláš Nevan.

La 18an de aprilo mi ĉeestis fakan demonstron de libroriparado en publika biblioteko en Monterey, Kalifornio.

Alvoko: Mi esperas, ke en sekvontaj jaroj pluraj personoj proprainiciate decidis subteni la arkivon per ofertoj de aĵoj, kiujn ili ne plu bezonas, por ke ni povu informi ilin, kion el tio ni povus utiligi. Ni interesiĝas pri ne nur presaĵoj, sed ankaŭ multobligitaj klubaj membrolistoj, bultenoj, tajpitaĵoj raportoj kaj prelegoj, statistikoj, biografioj, dokumentoj ktp. Fotografaĵoj devas ĉiam havi dorsflanke komenton kun nomoj de montritaj personoj, dato, loko ktp. Eltranĉaĵoj de artikoloj indiku kiam, kie kaj en kiu ĵurnalo ili aperis. Bv. adresi pakojn ne persone al: The Archives of the Esperanto League for North America, 62 Via Castanada, Monterey, CA 93940. Tiel vi rajtos uzi la avantaĝan poŝtan tarifon, kiu nomiĝas "Library Rate". Mi petas vian helpan kunlaboron.

—D-ro B. J. Balcar

ABONSERVO

Abonojn al ĉiuj esperantaj periodaĵoj de la mondo peras Esperanta Lingva Serva Kompanio, 3318 N. Lake Shore Drive, #801, Chicago, IL 60657. Sendu aŭfrankitan koverton por prezlisto de 78 gazetoj el 26 landoj.

ELNA NEWSLETTER

NEWS OF THE LANGUAGE PROBLEM AND ESPERANTO AS A SOLUTION

Published by the Esperanto League for North America. July-August 1974.
Editor: Charles R. L. Power. Editorial Committee: Robert Bailey, Margaret Hagler, Dorothy Holland, Jonathan Pool. Includes section in Esperanto, Bulteno, sent to ELNA members only.



Tonkin New UEA President

Dr. Humphrey Tonkin, Vice Provost for Undergraduate Studies at the University of Pennsylvania, is the newly elected President of the World Esperanto Association (UEA). He was named to the post in Hamburg, Germany, at the organization's annual international conference.

Tonkin, 34, is by vocation a scholar of British literature and holds an associate professorship in the University's Department of English. He is a recipient of the University's Lindback Award for Distinguished Teaching. In April, he was awarded a Guggenheim Fellowship, and he will be on leave next year, doing research on the structure of Edmund Spenser's Faerie Queene.

By avocation, however, Tonkin has long been an Esperantist. He holds the Diploma of the British Esperanto Association and has read, lectured and written in and about Esperanto for twenty years. He learned the language as a secondary school student in Great Britain, mostly, he says, to prove his language ability to a teacher who had thrown him out of a German class. By the end of the term he had not only passed his German exam, but had taught himself Esperanto as well.

"I learned it from a book, so I wasn't sure that I could speak it," he recounts. "Then I went to France, visited an Esperanto club, and used it—it worked!" He is, in addition, accomplished in French, Italian and Latin.

He attended his first Esperanto conference in 1956 and has been travelling and using the language ever since. "I've found it immensely useful as a way of making contacts abroad," he notes.

In 1959, he travelled for the first time to Poland, Esperanto's land of birth. There as in other countries, Tonkin found that Esperantists constituted something of a community, and that he could communicate with them at once, even about touchy political issues.

Throughout his years as an undergraduate at Cambridge University, England, Tonkin was active in the World Organization of Young Esperantists (TEJO). From 1961 to 1971, he consecutively held the offices of Treasurer, Vice President, General Secretary and President of TEJO. While studying for his Ph. D. at Harvard University, he taught Esperanto for the Harvard Esperanto Club—and there, among his students, met his wife, the former Julie Winberg. The two of them collaborated in editing an Esperanto translation of A. A. Milne's Winnie-the-Pooh, for which Tonkin wrote the introduction and a glossary. He is author of Esperanto and International Language Problems: A Research Bibliography (1967; third edition, revised, 1972).

Tonkin succeeds Ivo Lapenna, 65-year-old Professor of Comparative Law at the University of London. Lapenna, who became President of UEA in 1964, can be said to have been the guiding hand of the Association since 1955, when he became General Secretary. Among his many accomplishments, most memorable is probably his successful representation of the international language before the General Conference of UNESCO in Montevideo, Uruguay, in 1954. This led to the famous UNESCO resolution on Esperanto and later to official consultative relations between UNESCO and UEA.

Seven other newly elected officers join Tonkin: Vice Presidents Werner Bormann of the Federal Republic of Germany and C. Stöp-Bowitz of Norway, General Secretary E. L. M. Wensing of the Netherlands, and Members of the Board Pol Denoël of Belgium, Flora Szabó-Felső of Hungary, Stanisław Świstak of Poland, and E. J. Woessink of the Netherlands.

ELNA sends its very best wishes to the first American President of UEA!

MLA Seminar to Have Variety and Unity

The 1974 Seminar on Esperanto Language and Literature, scheduled for December 27 during the annual meeting of the Modern Language Association in New York City, will have both variety and unity, according to Dr. Margaret Hagler, leader of the Seminar. The papers to be read and discussed at the Seminar, set for 1:00 to 2:15 P. M. at the Hotel Americana, Chambord 14, cover various aspects of the Seminar topic "What Works Should Be Included in an Esperanto Anthology of 20th-Century American Literature?"

The topics of the papers, together with the participants, are as follows: "An Esperanto Anthology of Twentieth-Century American Literature", a discussion of the general principles that should guide an anthology, by Professor Dennis Q. McInerny, Bradley University, Peoria, Illinois; "Poetry in the Projected Esperanto Anthology of American Literature", by William Auld, Depute Rector, Lornshill Academy, Scotland, and Professor of Esperanto, San Francisco State University (Summer Sessions); "Willa Cather's Paradise Story: An American Novella which Should Be in the Projected Esperanto Anthology", by Professor John N. Hunter, University of Colorado, Boulder; "Muriel Rukeyser: A Major Contemporary Poet", by Miriam Hershenson, poet and translator, Brooklyn, New York; "De Rerum Dramaticum: American Plays for Translation to Esperanto", by Dr. Arthur Jasspé, Dramatists Guild, Lambs Club, New York.


Advance copies of the papers will be available after October 1 from Dr. M. Hagler, Lincoln Land Community College, Shepherd Road, Springfield, IL 62703.

Copenhagen in 1975

The 60th World Esperanto Congress will take place in Copenhagen, Denmark, 26 July through 2 August, it was decided in Hamburg.

1975 will be Scandinavia's Esperanto year, with the Pre-Congress set for northern Norway (precise location to be announced) and the Post-Congress in Frostavallen, Sweden, where several important Esperanto conferences have been located in the past.

Watch for further information right here!



Duncan Charters (left), whose pedagogical skill is rivaled only by his talents as impressionist, and Master of Ceremonies Ken Thomson greet Miss Spokane at ELNA Congress Banquet in Spokane.

Tape Service Open for Business

One of the less frequently exploited services of ELNA is the tape rental service which forms the major part of our Audio-Visual Section. Listening to Esperanto as it is spoken by those with a good international accent is an excellent aid in improving your own pronunciation habits, aside from giving useful listening-comprehension exercise. H. Ken Ver Ploeg, Director of the Section, advises that the following tapes are among those available:

4. The Universal Declaration of Human Rights, Ivo Lapenna, 40 min.
12. Job Hunters (comedy), Ivan Vazov, 25 min.
56. Western Influence on Japanese Ways of Thought, Hideo Yagi, 25 min.
128. The True Meaning of Words, Sandor Bako, 20 min.
139. Language Problems, Duncan Charters, 45 min.
164. Debate on the Neutrality of UEA, 56th UK (London), 105 min.

All tapes are available at \$1.00 for 30-day rental, on cassettes or reel-to-reel (please specify). For a complete list of nearly 200 tapes available, send a stamped self-addressed envelope to: ELNA Audio-Visual Section, 321 E. 19th Avenue, Spokane, WA 99203.



Blind Esperantists Rev. Wilbur Lane (left) and Dean Martineau are guided at ELNA Congress in Spokane by Mrs. Dorothy Holland, who teaches the international language through the Hadley School for the Blind in Illinois.

History of Esperanto in China

A recent paper from the Centre for Research and Documentation on the Language Problem probes the history of the international language in China from the turn of the century to the present day.

At its introduction into China, Esperanto was linked with revolutionary and anarchistic political movements. Some of the advocacy of Esperanto sprang from a linguistically naive feeling that the Chinese language was unsuitable to modern needs. Thus, in 1907, a group of Chinese anarchists in Paris pleaded that the complexity and writing system of Chinese necessitated the introduction of Esperanto as one step in China's modernization. Later, linguist Chen Hsuan-tung expressed a preference for Esperanto over the Oriental languages as a means of scientific expression. The Chinese intellectual establishment, though rarely as pessimistic about Chinese as Chen, generally expressed a high regard for Esperanto.

Tsai Yuan-pei, who with the Republican Revolution became Minister of Education, first ordered the introduction of the international language into the elementary schools. He was urged by a national conference of educators in 1921 to broaden Esperanto instruction. As a result, he invited the famous blind Russian Esperantist Vladimir Eroshenko to give a mandatory course at Peking University, of which Tsai was then Rector. Over five hundred students participated. In 1924, Tsai attended the 14th World Esperanto Congress in Helsinki as official representative of the Chinese government, one of several instances of such official Chinese representation at international Esperanto events.

One of the international language's greatest coups was accomplished through the aid of Wellington Koo, head of the Chinese delegation to the League of Nations. Favorable consideration of Esperanto on the part of the League under Koo's influence led to its

very full and well-documented report in 1922, Esperanto as an International Auxiliary Language, as well as to its subsequent successful recommendation to the Universal Telegraphic Union that Esperanto be admitted as a "clear language".

The centers of the Chinese Esperanto movement were Shanghai, Canton, Hankow and Peking. The Canton Esperanto Institute, founded in 1926, made possible the establishment of courses in two universities and 13 other schools in that city. The Shanghai Esperanto Association kept an extensive library and did a great deal of publishing. Members of the Shanghai circle played a vital role in the promotion of Latinxua, a romanization system for the Chinese language developed in the Soviet Union, which was introduced to China by the Esperanto translation of an article on the subject.

Esperanto was thoroughly utilized during the struggle against Japanese imperialism, with three periodicals and a series of government-sponsored pamphlets, including a speech by Chiang Kai-shek, published in the international language.

Esperanto has continued to be broadly used under the government of Mao Tse-tung, who said in 1939, "If one takes Esperanto as a medium for conveying the idea of true internationalism and the idea of true revolution, then Esperanto can and must be learned." Although the instruction of Esperanto has declined since the Cultural Revolution, there has been no halt to the publication of political propaganda. A monthly magazine, El Popola Ĉinio, combining high technical quality with low cost, is among the most widely read Esperanto periodicals in the world today. Books, pamphlets, picture postcards, calendars and many other items come out constantly. Short-wave broadcasts in Esperanto are made several times weekly.

As Ulrich Lins, author of the report, points out, "No other State uses Esperanto as extensively as China." It is surprising that the United States has given it such meager competition as yet.

U.S. Consul Greets Congress

Our sincerest compliments to U. S. Consul General John A. Brogan III, who represents our country in Hamburg, Germany. He not only came to the opening ceremonies of the 59th World Esperanto Congress, but was one of the relatively few official government representatives to address the Congress entirely in the international language. He was able to obtain an Esperanto translation of his planned remarks and learn the pronunciation just a few minutes before making his presentation, which received thunderous applause.



S
F
S
U
'74



A traditional part of the Esperanto Workshop taught every summer at San Francisco State University is the party at the home of Bill and Cathy Schulze. Left (front, left to right): Arthur Eikenberry, PA; Cathy Schulze, CA; John Victory, TX; Dr. Lloyd O'Connor, SFSU Director of Summer Sessions; (back) Victor Linard and son Jack, Ontario; Duncan Charters, instructor at the Workshop, IL; Charles Scull, CA. Right (back, left to right): Earl Bills, Esperanto songwriter and troubadour, TX; Charles Power, CA; Ron Brew, CA; Glen Herman, CA; (back) Nan Cassady, CA; and Workshop Director William Auld of Scotland.

Still More in '74!

Are major activities through for the year with the passing of summer? After all, the World Congress, the Youth Conference, the SAT Congress, the Summer University Courses—all that is over until 1975.

If you still have the itch to travel, though, don't despair! Look what is in store for you yet:

September

- 5-18 Midezygorze, Poland:
Golden Polish Autumn
- 6-8 Opava, Czechoslovakia:
Fifth Jubilee Meeting of
Esperantist Philatelists
- 6-8 Dudince, Czechoslovakia:
Friendly Get-Together
- 7-8 Cervera, Spain:
Sixteenth Catalan Convention
- 14-19 Verona, Italy:
45th Italian Esperanto Congress
- 14-25 Pamporovo, Bulgaria:
Golden Holiday
- 18-28 Kadyny, Poland:
Baltic Cultural Seminar
- 21-22 Kadyny and Gdansk, Poland:
International Youth Holidays
- 21-22 Renens, Switzerland:
Seventh Cultural Weekend
- 22-28 Magliaso, Switzerland:
15th European Holiday Week

October

- 6-15 Zagreb, Yugoslavia:
Seventh International Puppet
Theatre Festival
- 24 United Nations Day

November

- 2-3 Lugano, Switzerland:
Cultural Weekend
- 3-4 Kitakyusyu, Japan:
61st Japanese Esperanto Congress

December

- 10 Human Rights Day
- 15 Esperanto Book Day
(Zamenhof born, 1859)
- 29 Budapest, Hungary:
Winter Holiday begins
(through 3 January 1975)

Resolution of 22nd ELNA Congress

WHEREAS, linguistic chaos, discrimination and expense in increasingly felt at the UN and in other diplomatic circles, and

WHEREAS, Esperanto is a tested and proven language for international communication, increasingly recognized for its merits by experts in language and linguistics,

BE IT RESOLVED, that this Congress of ELNA ask the UN, the UN-USA, and other related organizations to sponsor an objective study of Esperanto as a solution to the present-day international language problem.

Raporto de la Kasisto

ĜENERALA KASO, 1974.06.21

Aktivo

Malnova saldo	\$ 7 450,63
Enspezoj: Kotizoj	5 689,00
Aliaj	<u>1 263,33</u>
SUMO	\$14 402,96

Pasivo

Vivmembreca konto	\$ 3 249,00
Ŝuldoj	3 000,00
Elspezoj: Organo	1 218,43
Administrado	2 693,15
JEN	22,00
Eksterlandaj revuoj	985,33
Dumvivaj membroj	234,50
Saldo pozitiva	<u>3 000,55</u>
SUMO	\$14 402,96

KONTO DE LA CENTRA OFICEJO, 1974.06.21

Aktivo

Enspezoj	\$6 440,79
Junulara konto	542,67
Rankin-konto	<u>75,00</u>
SUMO	\$7 058,46

Pasivo

Salajro	\$3 000,00
Lupago	750,00
Aliaj elspezoj	2 667,27
Saldo pozitiva	<u>641,19</u>
SUMO	\$7 058,46

—Peggy D. Linker

RECENZO

Hungara Vivo. Aperas dumonate, po 32p. Abonprezo \$5,00 jare ĉe ELNA Book Service.

Recenzo de periodaĵo estas afero nekutima, sed ĉi-okaze ege pravigebla. Ni ĵus lernis, ke Hungara Vivo havas proksimume cent abonantojn ekster orienta Eŭropo! Tio estas absolute nekredibla nombro por unu el la ĉiurilate plej imponaj anoj de nia tuta gazetaro.


Kompreneble, HV kiel organo de Hungara Esperanto-Asocio parte okupiĝas pri Hungarujo. Dum 1974, ekzemple, aperas numeroj pri la lando el turisma vidpunkto, pri ĝia ekonomio kaj pri ĝia scienco. Sed se vin ne interesas tio, eble vin allogos la alterne aperantaj numeroj pri la originala Esperanto-literaturo: prozo, poezio kaj dramo. Jes, kreu aŭ ne, oni dediĉos numeron al nia originala dramo! Pasintaj numeroj okupiĝis pri Literatura Mondo (kiun HV iusence anstataŭas), Kálmán Kalocsay (de kies plumo venas io en preskaŭ ĉiun numeron), Sándor Szathmári (ankaŭ ofta aperanto), Budapeŝto, kaj hungara poeto Sándor Petőfi.

Regule aperas "Revuo de Revuoj" de Lajos Tárkony (oportuna rimedo por teni sin ĝisdata pri la cetera gazetaro), "Panoramo" (mallongaj informoj pri hungaraj aktualaĵoj), "Ekzameno sen risko" de Vilmos Benczik (elprovu vian scion pri nia literaturo!) kaj tre solvinda krucvortenigmo (ne por sensciuloj!). Eĉ—ĉu ni kuraĝu diri?—jes, eĉ la reklamoj estas ofte legindaj! Kelkaj povus tre utili por la alproprigo de teknikaj terminoj.

Cetere oni trovas originalajn kaj tradukitajn novelojn, poemojn, eseojn ktp. de Eli Urbanová, William Auld, István Szerdahelyi....

Kiel HV sukcesas tiel brili? Eble helpas la fakto, ke ĝi ne nur tute regule aperadas, sed eĉ pagas honorarion por ĉiu kontribuo, afero tradicirompa ĉe niaj revuoj.

La abonprezo (\$5,00, ne \$3,50 kiel en la ELNA-librolisto, ni bedaŭras; ankaŭ Esperantujo suferas inflacion) estas bagatela por tiakvalita eldonaĵo. Ne maltrafu la okazon!




ELNA-Prezidanto E. James Lieberman, M. D., salutas Miss Spokane ĉe la 22a Kongreso de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko.

KAMIZOLOJ "NE KROKODILU"



Por sciigi pri prezoj, grandecoj, koloroj ktp. de kamizoloj (angle: T-shirts) kun la devizo "Ne krokidilu!" sub la ĉi-supra desegnaĵo, skribu al la Esperanto-Klubo de Dentono, P. O. Box 9792, NTSU, Denton, TX 76203.



Detalan planon por kluba jaro 1975-75, inkluzivanta Zamenhof-Bankedon, viziton al UN kaj regionan kongreson de Nov-Anglujo, jam faris Hoosac Valley Esperanto-Klubo. Antaŭa vico, de maldekstre: Allan C. Boschen (gvidanto), Stanleo Weslaŭski, Johano Ŝtormo, Debbie Lillie, Tim Bushika; meze, David Sookej, Peggy Degen, Pam Bokowski, Suzano Mikso, Katrino Mikaniewicz, Kareno Hayden, Karen Murach; malantaŭe, Francisko Grisvoldo, Stevo Hakes, Kito Foster, Paulo Roemelt, Davido Rikardoj, Ĉuko Welch, Jimo Zappone. Jen estontaj gvidantoj de la masasuseca movado!

ANONCETOJ

S-ino Vlasta Novoselac, de Ivaniĉgradska 61, 41 000 Zagreb, Jugoslavio, deziras gastigi unu aŭ du Esperantistojn en sia loĝejo (se eble tiun ĉi jaron), kaj poste esti gastigata en ilia loĝejo. Preferas aŭ en Los Angeles, Kalifornio, aŭ en apudeco.

Deziras korespondantaron, kiu scipovas Esp-on kaj la hispanan, s-ro Eldred Woodrow Lowe, E. Second and Osage, P. O. Box 535, De Soto, KS 66018.

Korespondantojn kaj kontaktojn kun alia Esp-grupo serĉas societo "La Verda Stelo", ĉe la sekretario, s-ro Toki Kuzmanoviĉ, 11300 Smederevo, Kenedijeva 6, Jugoslavio.

Fraŭlo, kuracisto-veterinaro, deziras korespondantinojn 20- ĝis 30-jarajn el Usono. D-ro Antônio Wilmário Rolim, Av. Felino Barroso 810, Bairro de Fátima, 60.000—Fortaleza-Ceará, Brazilo.

14-jara esperantisto deziras korespondi kun usona knabino. S-ro Tiboro Világoš, 7754 Bóly, Ady E. u. 11, Hungarujo.

VIZITONTE LA CENTRAN OFICEJON, nepre antaŭsciigu nin! Tel: (415) 343-3844 aŭ 573-1070.

Volas pliperfektigi sian Esperanton korespondante kun usonaninoj kaj usonanoj s-ro Stefan Petrov, Varna-10, kv. Ĉajka, str. Kap. Devjatko, bloko 8, enir. 5, et. II, ap. 7, Bulgario.

14-jara ŝatantino de teniso, korbopilko, desegnado kaj kino volas intersangi bildkartojn kaj portretojn de filmgeaktoroj. BUSÁK Eva, 4400 Nyiregyháza, Stadion ut. 20. III/8, Hungario.

Kirklanda Esperanto-Centro planas ambician eldonprogramon. Por prospekto, sendu afrankitan koverton al KEC, 1856 Third Street, Kirkland, WA 98033.

Tre volas korespondi, prefere sed ne necese kun 16-jara knabo, f-ino Carmen Perez Calera, Calle Atocha No. 69-4^o, Madrid 12, Hispanujo.

Informojn pri SAT kaj Sennaciismo provizas la Landa Peranto de la Sennaciista Frakcio, Karl Pov, 1221 S. El Camino Real, n-ro 304, San Mateo, CA 94402.

Batalo de l' Jarcento

Ĉiuj esperantistoj, kiuj intencas viziti Kinŝason okaze de la Batalo de l' Jarcento inter Ali kaj Foreman, bv. kontakti s-ron Nsimba Ufumu Ndongala, B. P. 16 332, Kinshasa, Zairo, Afriko. Dankon!

Zigzage tra Esperantujo

Alberta Casey, kies kantado multe kontribuis al la ĉi-jara Kalifornia Konferenco en Tiĥuano, montris plu sian talenton kiam ŝi kaj konata esperantisto-antropologo d-ro David K. Jordan aperis televide ĉe la programo "Day-break", 6:30 atm., la 17an de junio. Ilin intervjuis la programestro, Raff Ahlgren, pri la lingvo internacia. La programo estis spektebla en la san-diega regiono.

Bonaspektan novaĵleteron eldonas ESIC (Esperanto-Societo de Iowa City). La lasta numero alportis iom pri la historio kaj la gramatiko de Esperanto, kaj interesan rakonton "Vojaĝo en kovrita vagono" de L. A. Ware. Ĉu via klubo sendadas sian bultenon al la Centra Oficejo?

Prelegis d-ro David Jagerman ĉe la Esperanto-Societo de Nov-Jorko pri "La specifaj karakterizoj de esperantaj radikoj kaj ties rolo en vortkunmetado" en junio.

La Esperanto-Klubo de Los Angeles aŭdis pri sia historio de multjara klubano d-ro Charles Witt. La junia bulteno ankaŭ atentigas pri la bezono gisdatigi la kluban bibliotekon per donaco de malnovaj gazetoj.

Ampleksa artikolo "Notes: Esperanto, A 'Lingvo por Turisto'" aperinta en The New York Times, la 4an de aŭgusto, venigis plurdek informpetojn al la Centra Oficejo.

Dank' al la nelacigebla R. Kent Jones aperis favora kaj senerara artikolo pri la internacia lingvo sub la rubriko "Your World Tomorrow" de Michael Kohlbenschlag, en The Toledo Times, la 24an de junio.

"Kia Lingvo!" en la serio The World Almanac de Herb. Daniels aperis en Chicago Tribune Magazine, la 14an de julio.

Jam la 13an jaron radistacio WOPA en Ĉikago dissendas Esperanto-lecionojn ĉiusemajne po 15 minutoj. La instruisto estas s-ro John Fleming ĉi-foje.

Raporto de AAIE

La raporto de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto aperas en ties Bulteno. Se vi instruas aŭ intencas instrui Esperanton sed ne estas ano de AAIE, nepre korektu tiun situacion! Skribu al s-ro Lewis Cook, Jr., Koresponda Sekretario, AAIE, Box 442, Circleville, OH 43113, por aliĝilo.

Senlaborec-raĵtoj multlingve

La Ohia Buroo de Senlaborecaj Servoj (OBES) elspezis kvar mil dolarojn por 7 500 ekzempleroj de multlingva broŝureto por ke tiuj, kiuj ne parolas la anglan, povu kompreni kiel fari petojn por senlaborec-kompensoj.

Per gazetara konferenco, William E. Garnes, OBES-administranto, diris, ke la broŝuretoj pretiĝis dum unu jaro, kaj ke ili donas mallongan klarigon pri kompensorajtoj laŭ la senlaborecaj legoj de Ohio.

Krom la angla, la anonco diris, estas la franca, germana, hispana, itala, araba, hungara, slovena, greka, ĉina, rumana, jida kaj pola lingvoj. (Elangligis Lewis Cook, Jr.)

Kanado kongresos Kalgario

La 17a Kanada Kongreso de Esperanto troviĝos en Kalgario, Alberto, de la 28a ĝis la 30a de junio 1975. Pro la samtempa okazo de la centjarfesto de Kalgario, multaj kongresanoj sendube volos daŭrigi sian restadon por ĝui la mondfaman Kalgarian Stampedon, de la 3a ĝis la 13a de julio 1975, kaj ankaŭ por ĝui tuttagajn ekskursojn al belegaj montaraj lokoj, kiel ekz. Banff kaj Lago Louise.

Por pliaj informoj kontaktu la LKK ĉe Kalgaria Esperanto-Grupo, 3019 Hampton Crescent, S. W., Calgary, Alberta, Kanado T3E 4R1.

DEER'S ESPERANTO SUPPLY

12946 N. E. HANCOCK
PORTLAND, OREGON 97230

Ni akceptas abonojn por la jenaj eldonaĵoj:

PACO

Organo de Mondpaca Esperantista Movado

Eldonata ĉefe en Bulgario

6 numeroj jare

Prezo: \$3,50 jare

UNITARA ESPERANTISTO

Bulteno de Unitaraj Esperantistoj

Eldonata en Usono

4 numeroj jare

Prezo: \$1,00 jare

ISRAELA ESPERANTISTO

Organo de Israela Esperanto-Ligo

Eldonata en Tel-Avivo

3 ĝis 4 numeroj jare

Prezo: \$3,00 jare

Por ricevi senkoston ekzempleron, sendu poŝtmarkon.

ELNA's booklist of several hundred titles, Price \$1.00, is free to members.

<u>Esperanto Language and History</u>			
<u>ESPERANTO FOR BEGINNERS</u> - M. Butler - 10 easy, introductory lessons	25¢ each	5 for \$1.00	
<u>INTERNACIA EKZAMENO: Specimenaĵ Demandoj</u> (1973)	6 p		.75
Sample questions from UEA exam, a highly specialized examination on the doctoral level (For ELNA exams, contact Book Service)			
<u>RACIAJ DERIVO KAJ VERBUZO</u> - Emilo Gasse - theory of word derivation	8 p		.45
Scouts <u>ĈU VI PAROLAS TENDARE?</u> - Corsetti & La Torre (TEJO)	95 p	paper	1.25
simple lesson format, abundantly illustrated			

<u>Prose</u>			
<u>ANNIE KAJ MONTMARTRE</u> - Raymond Schwartz - original novel	128 p	paper	3.75
A welcome reprinting of a popular original novel by a superb writer			
<u>EL LA VIVO DE BERVALA SENTAŬGULO</u> - Louis Beaucaire (Stafeto)	135 p	paper	3.95
A sequel to <u>Kruko kaj Baniko en Bervalo</u> . The humor and satire will be lost on those unacquainted with Esperanto culture. Beaucaire includes his address for "puritanoj dezirantaj insulti min."			
<u>VERDA ROBO</u> - Johan Hammond Rosbach - an original novel by an accomplished storyteller		paper	4.95
<u>ARGENTA DUOPO</u> - Baghy and Kalocsay	pp 201-327	paper	2.00
<u>LERTA LEGANTO</u> - Nos. 3, 4, and 5		each	.25
<u>Religion</u>			
<u>BUDHISMA TERMINARO</u> - compiled by Dr. Victor Sadler	large format	11 p	paper .50
<u>KATOLIKA TERMINARO</u> - Esperanto/Latino	56 p	paper	1.00

<u>Music</u>			
<u>KANTOKOLEKTO de BEA</u> - 49 lyrics with music		plastic cover	1.50
Includes: <u>Espero</u> , <u>Edelweiss</u> , <u>Lorelei</u> , <u>Brahms Lullaby</u> , <u>Auld Lang Syne</u> , <u>Lili Marlene</u> , <u>Silent Night</u> , etc.			
<u>ROSEROJ</u> (1974) - Ramona Van Dalsem - words and music	48 p	paper	2.25
12 songs including <u>Donu al mi vian manon</u> <u>Adiaŭa Kanto</u>			

<u>Phonograph Record</u>			
<u>NIKOLAJ RYTKOV, Elektitaj Eroj</u> (1974)	1p	33rpm	6.95
18 readings: 5 of Kalocsay; 3 of Kurzens; 2 of Shakespeare; others of Gorki, Rossetti, Solshenitzen, Auld, Boulton, Saburo, and Rytjkov himself (reviewed in UEA review, ESPERANTO, July/August 1974)			

<u>Informational Material</u>			
for <u>librarians</u> - Suggested basic titles for libraries - single sheet		each	.02

DELETE

p. 5	ESPERANTO: A COMPLETE GRAMMAR - Reed		
3	LERTA LEGANTO Nos. 1 and 2	-----	ADD Nos. 3, 4, 5

PRICE CHANGES

p. 7	English-Esperanto Dictionary - Fulcher & Long	3.95	
4	Tapes for Esperanto: A New Approach - tapes cover 12 programs	12.00	4 cassettes
4	Esperanto Teacher - Stuttard	1.25	
8	La Esperanta Konjugacio - Teo Jung	5.95	
7	Lyall's Guide is now <u>BONVOYAGE, LYALL'S GUIDE to 25 LANGUAGES of EUROPE</u>	2.95	paper
7	Say it in Esperanto	1.25	
4	Teach Yourself Esperanto - paper only	2.75	
7	Teach Yourself Esperanto Dictionary - Wells - paper only	3.95	
3	A FIRST COURSE IN ESPERANTO cassette set	40.00	

PRICE CHANGES for PERIODICALS

p.37	Hungara Vivo	5.00	
	Juna Amiko (for teenagers)	1.50	
	La Monda Lingvo-Problemo - Single issues	4.50	
	Norda Prismo	5.60	

DUE SOON

ANTAŬEN AL LA LABORO! (999 copies, 1974) - published in Japan
plena verkaro de L.L. Zamenhof, years 1892-1895 352 p bound

NOVELOJ DE LUSIN

PROVERBARO DE ESPERANTO - new printing